Joseph Freiherr von Eichendorff,

# In einem kühlen Grunde

In einem kühlen Grunde,
Da geht ein Mühlenrad,
|: Mein Liebchen ist verschwunden,
Das dort gewohnet hat. :|

2. Sie hat mir Treu' versprochen,
Gab mir ein' Ring dabei,
|: Sie hat die Treu' gebrochen,
Das Ringlein sprang entzwei. :|

3. Ich möcht' als Spielmann reisen
Wohl in die Welt hinaus
|: Und singen meine Weisen
Und geh' von Haus zu Haus. :|

4. Ich möcht' als Reiter fliegen
Wohl in die blut'ge Schlacht,
|: Um stille Feuer liegen
Im Feld bei dunkler Nacht. :|

5. Hör' ich das Mühlrad gehen,
Ich weiß nicht, was ich will;
|: Ich möcht' am liebsten sterben,
Da wär's auf einmal still. :|

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Joseph Freiherr von Eichendorff *(∗1788-03-10 – †1857-11-26).*

*Arg-1035-2100 (2014-05-31 17:39:50)*

*Tiu ĉi poemo troviĝas interalie en* `http://ingeb.org/Lieder/ineinemk.html`*. Vidu ankaŭ: . Tie estas aŭdebla ankaŭ la melodio. Pri la verkinto de la melodio vidu la vikipediejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Friedrich_GlΓëck`*.*

Joseph Freiherr von Eichendorff,

# La rompiĝinta ringeto

*tradukita de Chr. Pfeufer*

En ombra valo turnas
muela rado sin.
Jen loĝis mia kara -
ŝi nun forlasis min.

Fidelon ŝi promesis,
ringeton donis ŝi:
Fidelon ŝi forgesis,
rompiĝis ring' de mi.

Migradi mi dezirus
for, kiel muzikant';
kaj kie ajn mi irus,
resonus mia kant'.

Mi volus bataladi,
rajdante tra l'kampar',
ĉe l'fajro dormkuŝadi
dum nokt' en la tendar'.

La rado plu rondiras;
revante aŭdas mi.
La morton mi sopiras,
kvieton donus ĝi.

*Traduko de la Germana poemo "In einem kühlen Grunde" de* Joseph Freiherr von Eichendorff *(∗1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de Chr. Pfeufer.*

*Arg-1035-2101 (2014-05-31 17:34:45)*

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann, sur la paĝo 22 kaj 23. Erare estas indikite tie, ke la poeziaĵon verkis Wilhelm Müller.*